# TESTO 44

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** Atendis, atendis, ĝis lin **ĉ ˽ rk ˽** etendis.

**2.** Malgraŭ la malprefero de Agnesa, Matzerath aĉetis angilojn kaj hejme li kuir-majstre igis ilin tagmanĝo – li **tr ˽ d ˽ ˽** la angilaĵon ankaŭ al la naŭziĝema Agnesa.

**3.** La reprezentantoj de greka Kipro proponas krei en la insulo **f ˽ d ˽ r ˽ c ˽ ˽ ˽** kun vastegaj rajtigoj kaj aŭtonomio de ambaŭ partoj.

**4.** Ŝajnas, ke Zog la 2a venkis en referendumo por restarigi monarkion, tamen la politikistoj **m ˽ n ˽vr ˽ ˽** kaj manipuladis, por ke ne estu restarigota reĝolando.

**5.** Mi ĉiam devas gaje petoli, fari **gr ˽ m ˽ c ˽ ˽ ˽** por ke la homoj ridu, kaj kiam ili donas al mi pomon kaj mi ekmordas, ĝi estas maldolĉa.

**6.** Serĉfosante en vendejo de **˽ r ˽ k ˽ nt ˽ ˽** libroj, unu el miaj filoj trovis kaj aĉetis kuriozan libron en la angla pri la "elfa lingvo" de Tolkien.

**7.** Okcidentaj ŝtatoj neniel realigis siajn **˽ r ˽ nd ˽ ˽ z ˽ ˽ ˽** promesojn, ene de deko da jaroj duonigi la nombron de malsatuloj tutmonde.

**8.** La aktoroj meritas admiron pro siaj neforgeseblaj **˽ p ˽ k ˽ ˽ kl ˽ ˽**, per kiuj ili ĝuigis la mondan esperantistaron dum Universalaj kaj Naciaj Kongresoj.

**9.** La finaj konkludoj de la grupo de prof. Zeng estas, ke la heredeco estas la baza faktoro, kiu determinas, ĉu homo havas **˽ ˽ nd ˽ nc ˽ ˽** al evoluo de nazofaringa kancero.

**10.** Kaskadio ampleksas la okcidentajn partojn de Kanado kaj Usono laŭlonge de la Pacifika marbordo kies arbaroj estas ĉefe borealaj kaj kies riveroj fluas en la Pacifikan **˽ c ˽ ˽ n ˽ ˽**.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** Neniu scias, de kie Italion venis la enigma **g ˽ nt ˽** etruska; tamen ie ili pruntis la arkaikan alfabeton pragrekan.

**2.** Produkti unu litron da brulaĵo el kolza oleo al la bienmastro kostas 0,44 eŭrojn, krome la restaĵo de la produktado estas uzebla kiel **f ˽ r ˽ ĝ ˽**.

**3.** – Tie, tie – diris Purun Bhagat surirante la deklivon de Sevalik, sur kiuj la **k ˽ kt ˽ ˽** staras rekte kiel sepobrakaj kandelingoj – tie mi ripozos kaj dediĉos mian vivon al la saĝo.

**4.** En Porto 20 000 **k ˽ h ˽ l ˽ ˽** ornamas la fasadon de la stacidomo.

**5.** Sur eta tablo estis telero da bongusta blanka fromaĝo, ŝutita per ruĝa **p ␣ pr ␣**, verŝita per heliantoleo, kaj botelo da lia aroma hejma brando.

**6.** Estas fakto, ke Cameron persvadis la skotajn pensiulojn, ke en sendependa Skotlando, iliaj **p ␣ ns ␣ ␣ ␣** reduktiĝus.

**7.** Fakte japanoj nun sin demandas, kiam erupcios Fuĵi, la plej granda kaj relative juna **v␣ ␣ k ␣ n ␣** en la lando, kiu eksplodis laste en la jaro 1707.

**8.** La riparisto komencis sakri kaj la **v␣ jn ␣ ␣** de lia kolo ŝveliĝis kiel ŝnuroj.

**9.** La fenicia proverbo diras: pli bona estas **h ␣ rd ␣ ␣** en la grenejo, ol oro en la dezerto.

**10.** Subite, plorinda kaj terura vidaĵo surprizis min: aro da ratoj estis eltiranta pecojn da **i ␣ t ␣ st ␣ ␣** el la ventroj de kadavroj.

## **Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

| gal’, cikatr’, ĉel’, hepat’, civit’, fig’, plonĝ’, dres’, vag’, impuls’. |
|---|

**1.** La problemo de la virusaj ␣ ␣ ␣ ␣ **t ␣ t ␣ ␣** estas unu el la plej signifoplenaj por la moderna kaj estonta medicino.

**2.** La fantaziema Herman Kessels okupas specialan lokon en la armea historio de Belgio kiel ekzemplo de ␣ ␣ ␣ ␣ ␣ **s ␣ m ␣**, nekontrolebla, revoluciema kaj perfida oficiro.

**3.** La okuloj de ĉiuj estaĵoj briletis tute ruĝe de kolero kaj ␣ ␣ **l ␣ c ␣**.

**4.** Sur la tria etaĝo, kiun iafoje ne atingis Nilo, kreskis palmoj, ␣ ␣ **g ␣ j ␣ ␣** kaj aliaj fruktarboj.

**5.** En la korton eniris du psiloj aŭ ␣ **r ␣ ␣ ␣ ␣ t ␣ ␣** de serpentoj kun sako plena de venenaj rampaĵoj kaj komencis spektaklon.

**6.** La viruso Zika respektas la normalan, sanan ␣ ␣ **l ␣ r ␣ ␣** de plenkreskaj personoj, forigante nur la ĉelojn frapitajn de tumoro.

**7.** Kiel helplingvo, esperanto povas esti unu rimedo inter aliaj por faciligi komunikadon inter ĉiuj ␣ ␣**v**␣ ␣ ␣ **n ␣ ␣** de Eŭropo.

**8.** Manuela Martins-Green, profesorino pri ĉela biologio asertis, ke ronĝulaj vundoj bezonis pli multe da tempo por ␣ ␣ ␣ ␣ **t ␣ ␣ ĝ ␣**.

**9.** Post du tagoj ni atingis la Grandan Muron, kiu estis konstruita kiel fortikaĵo por gardi la landon kontraŭ la sovaĝularoj, libere ␣ ␣ **g ␣ n ␣ ␣ ␣** tra la ebenaĵoj okcidente.

**10.** Anoj de la ␣ ␣ ␣ ␣ **ĝ ␣ s ␣ ␣** klubo Oktopusas el la litova havenurbo Klaipėda havas interesan tradicion por festi Kristnaskon kaj akompani la finiĝantan jaron.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** Antaŭ la vicoj de fosistoj kun pintohakiloj, pioĉoj kaj fosiloj, ĉiun kelkdekon da paŝoj, staris la majstroj: ĉiu havis en la mano dikan bastonon aŭ lignan ___, aŭ ortilon.

**a.** aknon **b.** cirkelon **c.** verukon **d.** terason

**2.** Wim De Smet, flandra zoologo, estis orda profesoro kaj plenrajta membro de la ___ Internacia de la Sciencoj en San Marino.

**a.** Akademio **b.** Ekspozicio **c.** Teraso **d.** Centralo

**3.** Se validus tervalora impostado, grandbienistoj ne plu povus toleri la elspezon teni neuzitaj milojn da ___.

**a.** maleoloj **b.** haringoj **c.** hektaroj **d.** emajloj

**4.** Dante Alighieri verkis sian faman trilogion *La dia* ___ inter ĉ. 1305 kaj 1321, do pli-malpli en la lastaj jaroj de la Mezepoko, tuj antaŭ la komenco de la Renesanco.

**a.** vegetalo **b.** malvo **c.** surtuto **d.** komedio

**5.** La faktoroj ekonomiaj jam antaŭ kelkaj jaroj faris anakronisma la vivtenadon de la revuo *El Popola Ĉinio* kun kelkdek-persona ___ kaj reduktiĝanta abonantaro.

**a.** etato **b.** vejno **c.** fungo **d.** materio

**6.** Kaj la ___ kolektiĝis al Jesuo, kaj rakontis al li ĉion, kion ili faris kaj instruis.

**a.** kandidatoj **b.** bovoj **c.** apostoloj **d.** barkoj

**7.** Rizo, uzata en ĉiu manĝo, estas pli ol nutraĵo, tuta rizo-civilizacio stampas la pejzaĝon, ĝi estos ___ da blanka rizo, parfumita rizo, nudeloj, vermiĉeloj, krespoj, alkoholaĵo.

**a.** rubando **b.** portreto **c.** dianto **d.** bovlo

**8.** Sed la vizaĝo de lia amiko, la kurba rideto de liaj lipoj ŝajnis en tiu minuto tiel ___, tiel neŝerca minaco brilis en liaj flamantaj okuloj, ke Arkadio eksentis nevolan timon.

**a.** elasta **b.** malica **c.** sekura **d.** lojala

**9.** Mi metis flanken la leteron kaj komencis ___ kafon kaj mielitan buterpanon.

**a.** prelegi **b.** liveri **c.** preskribi **d.** konsumi

**10.** En la epoko de Sovetio la eksterlando estis malpermesita teritorio, nur raraj unuopuloj ricevis la eblon gustumi tiun ekzotikon, sed antaŭe ili nepre pagis la plezuron iĝante ___.

**a.** incitintoj **b.** adorantoj **c.** denuncistoj **d.** propagandistoj